50a Jaro — N-ro 5 — Septembro - Octobro 1958a

# BELGA ESPERANTISTO

Oficiala dumonata Organo de

REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA
Asocio sen profita celo,
aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro-Administranto :
la Prezidanto de R.B L.E. :
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Fondita en 1908a
★
Abonprezo : Fr. 100,-

P. V. B. A.

**Jos. Vander Cruysse**

Planko-kaj murtegoloj Fasadŝtonoj Fenestrosojloj
kaj fenestrobretotegoloj
Artefarita ligno kaj izoligaj lignofibroplatoj, ktp ktp

**Oficejoj kaj Magazenoj :**
**Buiten Smedenpoort St-Andries-Brugge**
**telef. : 331.26 338.76 364.99**

daj samideanoj, kelkajn detalojn pri la 43a U.K. en Mainz kaj pri la Tejo-kongreso en Homburg (Saar).

La 18an, estis antaŭvidata komuna legado kaj ĉiuj ĉeestintoj legis folion el spritaj kaj interesaj libretoj pri la germanaj fervojoj.

La 25an, estis antaŭlegataj ekstraktoj el la libro « Miru, Pensu, Ridu » kaj pritraktataj elektitaj enigmoj pri kiuj la ĉeestantoj povis cerbumi. La kunsido estis ĉeestata de itala samideano, kiu rakontis siajn impresojn pri la Mondekspozicio.

**Programo de la venontaj kunsidoj**

**Septembro** : la 15an: Hispana samideano, S-ro Ramon Molera, prelegos pri « Hispanujo, Don Kihota Lando », kaj respondos al ĉiuj demandoj pri lia lando; la 22an: Perfektiga kurso, gvidota de S-ro van der Stempel; la 29an: Lovenaj gesamideanoj, F-ino Maryvonne Dehertoghe kaj S-ro A. Duchesne, prelegos pri sia « Vojaĝo al Jeruzalemo ».

**Oktobro** : la 6an: Parolata Jurnalo; la 13an: Sonbenda parolado de S-ro Sponar; la 20an: Perfektiga kurso; la 27an: S-ro Loeckx kantigos la ĉeestantojn.

**Novembro** : la 3an: Disdono de la premio por la parolata ĵurnalo. Unescodatreveno; Dimanĉon: la 26an: jara Festeno.

CHARLEROI

**Karloreĝa Grupo Esperantista**

La monatoj de julio kaj aŭgusto estis por la Grupo du libertempaj monatoj cetere meritataj post plena jaro de kurso kaj laboro.

La 26an de aŭgusto, okazis la 1-a kunveno de la nova lernojaro, kiu komenciĝis per publika kurso en la lernejo de « La Digue », en Charleroi, kaj kiu, ni ĉiuj esperas, estos ankoraŭ pli fruktodona ol tiu, kiu finiĝis.

VERVIERS

**Esperantista Grupo**

La « Esperantista Grupo Verviers » memorigas la ceremoniojn okazontajn en sia urbo la 13an kaj 14an de decembro proksima, okaze de la Ora Jubileo de la grupo.

Estas la intenco de la estraro prezenti interesan kaj allogan programon, kiu aperos en la proksima numero de la revuo.

Ekde nun, la komitato regule kunvenas kaj kunigas la materialon necesan por proponi al la ĉeestantoj dutagan renkontiĝon vere agrablan.

Ke ĉiu pripensu do la eblecon ĝin partopreni. Komence de novembro aliĝiloj estos dissendataj.

## Korespondado

— Lida MICHNOVA, Dupz pri AZNP Mlada Boleslav (Ĉeĥoslov.) deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

— Marko LATKI, Zagreb Crnĉiĉeva, 38 (Jugosl.) deziras korespondi kun juna fraŭlino aŭ fraŭlo.

— Haraldur Johannsson, Shellvegur, 2 Reykjavik - Islando deziras korespondi.

## Prospekto

Aperis bela multkolora turisma faldprospekto pri la sveda urbo Malmö, kiun oni povas peti al « Malmö Turisttrafikförening, Malmö, Svedujo. Oni skribu en Esperanto kaj petu la esperant-lingvan broŝuron.